DUMONATA REVUO / TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

# Sonorilo

66-A JARO, N-RO 5
SEPTEMBRO-OKTOBRO 1974
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St.-Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken.
Poŝtĉekkonto de BEF: 000-0163434-86 de BEF, Oude Donklaan 83, 2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.
Ĉefredaktoro: Fernand Roose.
Redakcia sekretario: Paul Peeraerts.




RABATO POR ESPERANTISTOJ

ESPERANTO EN LA LERNEJOJN !

Tiu ĉi tre grava artikolo alvenis ĉe ni du tagojn antaŭ la redaktofino. Ĉar ĝi estas ege interesa, ni volas ĝin nepre aperigi kompleta. Tial ni publikigos ĝin entute en la novembra-decembra numero de „Sonorilo".

La redakcia sekretario

<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

SUR LA KOVRILA FOTO

Tiuj ĉi homoj gvidos la tutmondan Esperanto-movadon dum la tri venontaj jaroj: la nova estraro de Universala Esperanto-Asocio post ĝia enoficiĝo. De maldekstre dekstren: D-ino Flóra Szábo-Felsö, la prezidanto de TEJO kaj en UEA estraranino i.a. pri kongresoj; D-ro Pol Denoël, prezidanto de BEF kaj en UEA estrarano pri taskoj specialaj; D-ro Carl Støp-Bowitz, vic-prezidanto; D-ro Humphry Tonkin, la nova prezidanto de UEA; D-ro Victor Sadler; Evert Woessink, estrarano pri financoj kaj E.L.M.Wensing, sekretario. Mankas sur la foto s-ro Marian Ŝvistak.



## ĉefartikolo

### ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA POLITIKO

Mi revenas al temo kiun mi jam plurfoje pritraktis: la negativa sinteno de la registaroj je Esperanto. Mi volas refoje komprenigi ĝin (ne pravigi!) kaj montri kial ni ne perdu paciencon kaj kuraĝon.

Cetere – kaj tio estas interesa kiel studobjekto kaj grava en ĝiaj konsekvencoj – Esperanto estas ne la sola valoro je kiu la registaroj sintenas negative. En esenco Esperanto estas internacia faktoro. Ĝi malpli apartenas al la enlanda ol al la eksterlanda politiko ĉar ĝi servas internaciajn rilatojn. En tio ĝi estas simila al aliaj problemoj kiel armado kaj paco.

Nu, precipe tri trajtoj karakterizas la internacian-eksterlandan politikon: 1) Estas la potencaj ŝtatoj kiuj gvidas tiun politikon dum la malgrandaj ŝtatoj devas toleri ĝin. Aldone : plej granda parto de tiuj malgrandaj, malpotencaj ŝtatoj estas ligitaj al iu "grandpotenco". 2) La demokratio preskaŭ ne intervenas en la gvidado de tiu politiko. Gvidantoj ne atentas la volon, la dezirojn de sia popolo en tiuj aferoj (kaj kelkfoje ne povas atenti ĝin). 3) Malgraŭ la laŭtega proklamado de belegaj principoj, estas en la realo nur la intereso (legu: la materian intereson kiel ekz. la ekonomion.) kiu diktas la sekvendan politikon.

Ĉiutage ni povas ĉerpi pruvojn de ĉi tio el la okazaĵoj pri kiuj la amasmedioj raportas. La historio estas plena je tiuj faktoj. Kelkajn el ili ni observu. Rilate la unuan karaktertrajton: kio okazas kiam iu satelito de Sovetio volas laŭiri pli sendependan vojon? Dua ekzemplo. En la momento kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, (meze de sept.'74) la belga ministro pri financoj plendas ĉar li ne estis invitita ĉe la kunveno de la financministroj de Usono, Japanujo, Okcident-Germanujo ktp. Ankaŭ tiu de Nederlando ne, nek tiu de Luksemburgo.

Rilate punkton 2 mi volas antaŭmeti jenajn konsiderojn. Estas evidente, ke iuj difinitaj elspezoj kaj difinitaj institucioj ne estus efektivigataj se antaŭe ili estus submetitaj al plebiscito. Ni devas konfesi ke ne ĉiam plimulto de la popolo kapablas prijuĝi ĝuste kaj ne ĉiam estas preta voĉdoni por oferoj, kvankam ili kelkfoje estas necesaj. Almenaŭ la reprezentantoj de tiuj popoloj devus partopreni la gvidadon de tiu politiko. Sed kion ni konstatas? Pli da decidoj estas prenataj en malgrandaj komitatoj de partiestroj aŭ ŝtatestroj. La partianoj sekvos laŭ ordono desupera. Denove, en la momento kiam mi tion ĉi skribas, kelkaj belgaj gazetoj postulas, ke la afero de la ŝanĝo de militaviadiloj estu pritraktata en plena parlamento, ĉar temas pri grandega elspezo en finance malfacilaj tempoj. Do oftege la demokratio ne intervenas en la politiko. Tial estis mokridinde kaj trompe, kiam la jugoslavia prezidento antaŭ jaroj, kaj jugoslavia altrangulo dum la beograda UK

en 1973 emfazis ke Esperanto devas esti en la direkton de la lernejo antaŭenpuŝata de la popolo mem.

En rilato kun punkto 3, ni volas memorigi la paroladojn de prez. Nixon. Preskaŭ ĉiam la celo de la parolado estis la paco kaj la liberigo de subpremado. Tial Usono intervenis en Vjetnamo. Sed kial ne en Haitio kontraŭ Papa - Doc ? Kial ne en Etiopio? Kial ne en multaj Sud-Amerikaj landoj kie daŭre ekzistas ekonomia ekspluatado? Kiuj havas la ekonomion de tiuj landoj en la manoj ?

Kaj ni, naivaj esperantistoj, demandus al tiuj ŝtatestroj: prenu Esperanton por viaj internaciaj intertraktadoj ! Dum la estroj de la potencaj ŝtatoj spezas milionojn por disvastigi sian lingvon.

Ĉu do nia afero estas al malsukceso kondamnita ? Ne. IO devigos iam tiujn politikistojn ŝanĝi sian sintenon je Esperanto... Tiu „io" estas la evoluo de nia homaro. Tion ili ne havas en la manoj. Tion ili ne kapablas manipuli. Malgraŭ multegaj obstakloj kaj malfacilaĵoj, unuigita Eŭropo formiĝos, devos formiĝi... Unu de tiuj malfacilaĵoj estas la lingva. Tial kreskanta nombro da europaj konferencoj aŭ kongresoj okupiĝas pri tiuj malfacilaĵoj. Provizore ili elsaviĝas per kelkaj lingvoj ĉar fakte ili unuigas nur la duonon de tiu kontinento. Sed kio kiam la tuta kontinento unuiĝos? Kaj kio kiam tuta homaro unuiĝos? Unuiĝo kiu formiĝos el multe pli da nacioj ol nun ĉar nun multaj estas ankoraŭ en la stadio de evoluiĝo. Lingvaj malfacilaĵoj kreskos ĉiusemajne, ĉiutage. Kaj ili en terura rapideco kreskas daŭre. Pro tiu rapidega evoluo Prof. Lapenna – pri kiu mi pensas ke li estis racia homo – „kredas ke estas afero de nur kelkaj jaroj, ne plu de jardekoj, ĝis la tuta homaro devos akcepti unu solan lingvon" (el festparolado dum la 59-a UK). Efektive por tio oni iam devos trovi solvon. Kaj kiam oni konstatos la fiaskon de la naciaj lingvoj por tio (vidu antaŭe aperintan artikolon en „Sonorilo") tiam venos la ŝanco por Esperanto.

Dume – ĉar ne ekzistas reguloj sen esceptoj – kelkaj raciaj politikistoj bonintencaj kaj objektivaj ne nur rekonas la valoron de Esperanto, sed mem lernis ĝin. Inter tiuj malmultaj troviĝas la aŭstralia ambasadoro R. Harry kies meritoj estas grandegaj. Mi povus citi aliajn kiel la svedan parlamentanon E. Dahl. Sed la celo tie ĉi ne estas fari liston. De aliaj ni rajtas demandi kion fakte ili faris por Esperanto. Ĉiuokaze ni havas iomete la impreson ke ili povus fari pli. Kun tre scivola atento ni observos la evoluon de la promesa angla parlamenta grupo. Intertempe, ekster tiuj ĉi, multaj gvidantaj personoj el nepolitikaj kampoj, puŝitaj malpli pro intereso, kaj multaj kulturaj organizaĵoj estos jam favoraj rilate Esperanton aŭ akceptos ĝin. La lastaj estos la politikistoj, kiuj faros tion. Ĉar ne la politikistoj gvidas la evoluon. Ili postpromenadas ĝin ! Ω

F. Roose

ΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔ

Dio ne povas esti ĉie; pro tio Li kreis la virinon. (Juda proverbo)



## movado

### LA DUA ESPERANTO-TAGO : RIMARKINDA EVENTO

Tiun ĉi duan Esperanto-tagon la organizantoj ellaboris kun tri diversaj celoj : kunvenigi ĉiujn agantojn por la internacia lingvo; montri la aplikadon de Esperanto en la moderna kino-arto; krei kondiĉon por vasta informado pri nia lingvo.

Ni priparolu ĉiujn tri punktojn: El nombra vidpunkto la tago verŝajne ne estis malsukceso. Malgraŭ la malbona vetero kvin plenaj aŭtobusoj gvidis nin tra la plej belaj partoj de la brusela ĉirkaŭaĵo. Pri tiu rondgvidado tamen aŭdiĝis pluraj kritikoj. Je ĉiu haltejo la libera tempo ĝenerale ne sufiĉis por ion vidi au viziti. Estintus pli bone viziti nur unu aŭ du indaĵojn sed dum iom pli longa tempo. Oni ankaŭ riproĉis, ke la homoj el ĉiuj landpartoj jes kunvenis, sed preskaŭ ne havis okazon interkonatiĝi. Ambaŭ tiuj rimarkoj eble povus esti valoraj sugestoj por onta agado.

La ĉefa punkto de la tago estis montrado de kvino da Esperanto-filmoj. Ili temis pri FIAT, norvegaj fervojoj kaj pri Aŭstralio. Pri ili ni intervjuis ĉeestintan spertulon pri mallongaj filmoj kiu klarigis, ke la nivelo de preskaŭ ĉiuj restis sub la mezo. La fakto, ke ili estas Esperantlingvaj estas eĉ malreklamo por nia lingvo, se la kvalito estas malbona. Laŭ li, nur unu filmo (la aŭstralia) atingis ian gradon de profesieco, sed tie bedaŭrinde la teruran misprononcon denove vere ruinigis multon.

La plej granda realigaĵo de la Esperanto-tago tamen estis ne rekte ligita al la okazintaĵo mem, nome la informado al la ekstera publiko. La tagon antaŭe okazis gazetara konferenco kiu konis relative vastan eĥon. Laŭ niaj ciferoj, kiuj tamen povas esti nekompletaj, 28 gazetartikoloj aperis pri Esperanto, rekte aŭ malrekte sekve de la konferenco aŭ de la Esperanto-tago mem. De tiuj 28 artikoloj 10 estis franclingvaj kaj 18 nederlandlingvaj. La plej granda artikolo certe aperis en " De Rode Vaan" (revuo de la Belga Komunista Partio). Sur kvar kompletaj paĝoj aperis bonega informa teksto, certe unu el la plej bonaj iam publicitaj en belga ĵurnalo, kune kun listo de ĉeesteblaj Esperanto-kursoj.

La radio menciis laŭ nia scio Esperanton plurfoje. Unue dum mallonga sed tre bona intervjuo kun s-ro Roger Van Humbeeck, kaj due dum la novaĵelsendoj la Esperanto-tagon mem.

La kulmino certe estis 30-minuta televizia programo de la BRT. Ĝi konsistis el preskaŭ nur intervjuoj kun 5 personoj kiuj konas Esperanton. La tuta programo sendube estis bonega, kaj ĉiuj kunlaborintoj, ekde sinjoro De Bruyne, kiu sukcesis kapti la interesiĝon de la BRT-anoj ĝis la gejunuloj kiuj povis diri nur unu frazon, ĉiuj meritas

nian plej varman gratulon kaj dankon.

Sed ĉu ĉio tio havos vere rezulton ? Ĉu la televizia programo kaj la pluraj gazetartikoloj iel efikos? Certe jes, ni semas kaj semas konstante, kaj se tiu ĉi Esperanto-tago estis eĉ nur unu semeto, tiam ĝi valoris. Tamen ni devas realisme konstati ke ĝi efektive estis ne pli ol malgranda semeto. Post la televizia programo, spektita de minimume duona miliono, venis malpli ol cent informpetoj, el kiuj, se ni estas tre optimismaj, eble la duono iam sekvos kurson kaj unu kvarono ĝin finos. Maksimume 25 personoj do, el duona miliono. Kaj tamen la programo estis tre bona. Responde al la kvarpaĝa artikolo en "De Rode Vaan" venis, almenaŭ ĉe la antverpena adreso, neniu reago... Kaj tamen la artikolo estis tre bona.

Kial do tiuj mizeraj rezultoj? Tutcerte ĉar la 20-jarcenta homo ankoraŭ ne konstatis ke ekzistas lingva problemo en la mondo. Li ĉiam ankoraŭ kredas, ke Esperanto estas ne malbona inventaĵo sed jam eksmodiĝinta superflua lingvaĵo ĉar ja tradukistoj, interpretistoj kaj tradukmaŝinoj solvis ĉion. Li tute ne sentas la plej etan bezonon havi ion kiel Esperanton.

Kaj jen devus troviĝi nia tasko. Informi pri Esperanto, tutcerte, sed plej unue informi la aliajn pri la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj facetoj. Kaj ĉi tio estas tasko ne nur de la redaktoroj de "Esperanto Panorama" kaj "L'Esperanto en Marche", sed ĉefe de vi mem, de vi leganto... Al persono sata oni buterpanon ne vendos. Vi zorgu, ke la homo iĝu konscia pri la lingvo-problemoj. Kaj nur tiam li malsatos al ilia solvo. Ω

Paul Peeraerts

ΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔΔ

## Niaj legantoj opinias ...

La nekredebla tamen okazis. Pluraj legantoj de „Sonorilo" komunikis al ni sian opinion pri la pasinta numero. Pri la tipografio ĉiuj samopiniis ke ĝi fariĝis pli bela kaj pli legebla. Bedaŭrinde multaj numeroj estis iomete tro grize presitaj, kio do nuligis la pli bonan legeblecon. Pluraj protestis kontraŭ la uzo de „u" sen hoko por la duonvokalo „ŭ". La kialoj estis teĥnikaj kaj en tiu ĉi numero jam parte solvitaj.

Rilate la enhavon multaj el niaj legantoj konstatis progreson. El Kortrejko S-ro De Brouwere tamen plendis „ke la inaŭguro de la E-Biblioteko valoris nur 6 liniojn dum ke por la pola radio-konkurso kaj busvojaĝo de la pola turisma buroo pri kio tutcerte neniu el la legantoj interesiĝas (?) estis rezervita pli ol unu kolono...". Grandparte vi pravas en tiu ĉi rilato, sed ankaŭ tie la kaŭzoj estis teĥnikaj. Kiam alvenis la teksto pri la inaŭguro, la polaj tekstoj jam estis tajpitaj kaj ni ne disponis pri pli da loko. Sed venontfoje ni pri tio atentos!

D-ro Wim De Smet laŭdas la plibonigojn sed esperas ke ili ne malhelpos la fondiĝon de komuna revuo por ĉiuj landaj sekcioj... Certe ne, sed tiam almenaŭ ni povos „finir en beauté" ! Ω



## mozaiko

La svisa urbeto Romanshorn aldonas al ĉiu petita informprospekto en kiu ajn lingvo resumon en Esperanto. Petebla de Trafikoficejo, Bahnhofplatz, CH-8590 Romanshorn. Ω

Esperantistoj, membroj de „Belga Socialista Partio", estas petataj informi pri tio s-ron B. Denoël, Esplanade de la Paix 6/176, 4400 Herstal. Ω

Ni ricevis la jenan interesan anoncon el Jugoslavio: „Mi deziras korespondi kun junuloj el Belgio. Mi estas 17-jara knabino, interesiĝas pri moderna muziko, pentrarto kaj fiŝkapto. Mi estas romantika sed ankaŭ fajra. Tubić Savka, Milana Uzelca, 11080 Zemun, Jugoslavio." Knaboj eku! Ω

Ĉu vi estas junulo kaj ĉu vi deziras preskaŭ senkoste tranokti en diversaj landoj ? Ĉu vi posedas kroman liton kaj volus gastigi kontraŭ malgranda rekompenco junajn esperantistojn ? Petu informojn de s-ino J.M. Cash, 72 rue de Rennes, F-75006 Paris. Ω

Tuj post la Universala Esperanto Kongreso en Hamburgo, pri kiu la gazetaro en Germanujo amase raportis, aperis grandaj pagitaj anoncoj de Berlitz-lernejoj pri la valoro de la angla kiel internacia lingvo. Ω

Mi interesiĝas pri komerco, lingvoj, muziko, literaturo, kantado, geografio kaj estas 40-jara. Mi dezirus fari kontaktojn kun amikoj en Belgio. Libor Matějká, Pekařska 68, CS-60200, Brno, Ĉeĥoslovakio. Ω

La fama Esperanto-kurso „Esperanto Programita" fine de ĉi tiu jaro aperos ankaŭ en la portugala lingvo. Ricevebla ĉe s-ro L. Rieger, Av. Mem de Sà 319, Rio de Janeiro, Brazilo. Ω

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo" faras tajp- kaj kompost-laboron. Haveblas pluraj litertipoj, simboloj ktp. Petu prezoferton kaj informojn de Drakenhoflaan 97 - 2100 Deurne. Ω

Dum la SICOB-ekspozicio pri informatiko en Parizo estis montrata instrumaŝino por la lernado de Esperanto. Ĝi baziĝas sur la Esperanto-kurso de s-ro H.Behrmann „Esperanto Programita". Ω

La franca poŝtadministracio informas, ke nur la lingvoj germana, angla, hispana, esperanta, franca, pola kaj rusa estas allasataj por la redakto de gazettelegramoj al Pollando. Ω

En Aŭstralio haveblas tabakspeco kiu nomiĝas "Esperanto - The International Language"... Ω

En la oficialaj kursoj pri la Internacia Lingvo en Antverpeno 32 lernantoj enskribiĝis ĉi-jare. Ω

Aperis "Manlibro de varbado" kiu estas vera nepraĵo por sekretarioj kaj aliaj respondeculoj de ĉu loka ĉu internacia organizo. Ĝi klare klarigas efikajn varbmetodojn por la Internacia Lingvo.La rezultoj nepre pliboniĝos post la legado kaj aplikado de tiu verko. Ĝi estas havebla kontraŭ 90,- fr. ĉe P.Peeraerts, Drakenhoflaan 97 2100 Deurne (pĉk. 000-1011508-89)

## libroj

Jean Habert (†) kaj Marcel Boubou (†): "Nouveau Cours Rationnel et complet d'Esperanto". 180 paĝoj. Prezo 16 FF. Eld. SAT-Amikaro, Parizo.

Iom mirige, ke ni recenzas libron de du personoj jam delonge mortintaj ! Ĝi estas jam la oka eldono de lernolibro kiu aperis unuafoje en 1921. Kun emfazo ni devas laŭdi tiun libron pro ĝia klareco (ekzemple pri la akuzativo), pro la ekzercoj, kaj ankaŭ grandparte pro la desegnaĵoj instruantaj multajn vortojn. Kelkaj rimarkoj : la prizorgantoj estus devintaj mencii, ke la litero "ŭ" estas konsonanto, se ne oni ne komprenas la akcenton en vortoj kiaj "neŭtra(la)" k.a. La klarigoj pri la uzo de "sia" estas tute ne kompletaj. Tiu afero ja estas granda malfacilaĵo en Esperanto. Malgraŭ tio, sininstruantoj disponas tie ĉi pri plej bona libro. Aliflanke mi scias ankaŭ el sperto, ke plej bona libro eble ne taŭgos en la manoj de iuj instruantoj kiuj ĉiuj havas sian metodon tute propran, tute personan. Tamen mi pensas ke per tiu ĉi kurso, preskaŭ ĉiuj profesoroj havos bonegan helpilon.

Ψ

Ivo Lapenna: "Por pli efika informado". Eldonis UEA. 20 paĝoj, ilustrita. Prezo: 36 fr.

Estis tempo en kiu ni devis propagandi Esperanton. Alvenis la tempo en kiu ni devas informi pri Esperanto. Cetere la ĝusta informado estas nuntempe la plej bona propagando. Malfeliĉe multaj informas laŭ malbona maniero. Eĉ plej malfeliĉe estas ke ili tute ne konscias pri tio. Tial ĉiuj — ankaŭ tiuj, kiuj pensas esti neeraripovaj rilate informadon — ĉi tiun broŝuron devas legi. Kun miro ili konstatos, ke iun faceton ili ne pripensis, ke iun detalon ili forgesis. Ili konstatos ankaŭ, ke tre bona kono de la Esperanta lingvo, literaturo, historio, de aliaj projektoj (ne diru lingvoj!) estas antaŭ-kondiĉo por iĝi bona informanto. La broŝuro entenas la artikolserion de Lapenna publikigita en la revuo "Esperanto".

Ψ

Jo Haazen: "Konsideroj". Stencilita broŝuro 27-paĝa. 50 fr.

Fronte al la Esperanto-movado, s-ro J. Haazen havas la vidpunkton kiun devus havi ĉiu, kiu portas la respondecon de iu gvida posteno, nome tiun de observanto tre kritika (en la etimologia senco), de pripensanto kiu ree kaj denove pripensas nian aferon. Sen kapoj pensantaj nia afero estas al morto kondamnita. Li ankaŭ havas la vidpunkton de iu kiu sentas iun timon fojfoje. Ni devas konfesi ke nia movado nunmomente montras la aspektojn iome timigajn. Tiu "Konsideroj" — en kiu tute ne mankas la sentimentaleca elemento — alvokas al pripensado de du elementoj: 1-e la ĝusta lokigo de nia movado en la kadro de la ĝenerala homa civiliza evoluo kaj 2-e la problemo de la revuoj. Ambaŭ estas gravaj. Ne atendu de la broŝuro ĝisfundan pritraktadon de la problemoj, nek perspektivojn. Nur atentigo ĝi estas. J.H. ne pensu ke ĉio dependos de la ĝusta nomdono al niaj organizado kaj grupoj. La kaŭzoj de prospero au malprospero kuŝas evidente pli profunde. J.H. skribas, ke problemoj kiel tiu de milito kaj paco ne jam estas solvitaj "precipe pro manko de sufiĉe da racio...". Sed... La homo ja ne estas sole racia estaĵo, ja ankaŭ pasia estaĵo ! Mi atentigas la espereble multajn aĉetontojn, ke estas aldonita en la kajero la "Tria Baza Laborplano de UEA" kaj fine ne pli ol 5 paĝoj tute blankaj... por skribi eventualajn notojn. Jen novaĵo kiun devus ĉiuj eldonantoj imiti, se almenaŭ la nuna papermanko kaj la altaj eldonkostoj permesas tion!

Ψ

Baldur Ragnarsson: „Esploroj" - Eldonita de Stafeto, La Laguna - Tenerife. 122 p.

El la poetoj verkantaj modernajn poeziformojn Ragnarsson apartenas kun Auld kaj De Kock al la pli gravaj.

ESPLOROJ ne estas facila legaĵo. Supraĵlege oni ne lasas penetri en sin la signifon de la versaĵoj nek ilian kunligon, do nepre ne povas penetrigi la signifon de tuta poemo. Des malpli permesas legado hasta eniri la vastan mondon, kiu kuŝas kaŝita en la sondendaj (sed eble ne elsondeblaj) profundoj de la poemo. Tiu ĉi poezio postulas kaj meritas nian p(l)enan atenton. Necesas aktive esplori la profundajn realoj ofte nur implicite esprimitajn. Sed unu fojon malkovrinte la riĉon de iu poemo, ni ŝatas kaj ĝuas relegi ĝin.

Vere brilaj estas jenaj eroj en tiu poemaro: la sagacaj „Nerimarkitaj herboj" kaj „Du silentoj", la pli simplaj „En fremda kvartalo", „Nova vivo" kaj „Akvoj". La valoro de ESPLOROJ por ĉiu aparte dependas de la cerbostreĉo farita kaj rekompencas ĉi tiun.

Ĉe multaj realaĵoj de la ĉiutaga vivo ni ne haltas. Ni glitas preter ili kaj pro nia malatento ili restas nebulaj, svagaj, ŝajnecaj. Poezio estas esploro, kiu donas al tiuj faktan realecon: daŭron al la efemera sento, konkretan formon al abstrakta ideo. Poemoj estas fiksitaj esplorrezultoj. Jen la prologa tezo de Ragnarsson, kiu laŭdas Esperanton kiel aparte taŭgan por tia esplorado. Pro sia vortfarada dinamikeco ĝi ebligas al la poeto pli koncize kaj trafe esprimi sin kaj la leganton ĝi invitas analizi la kunmetaĵojn, esplori la sencojn kaj trovi la kaŝitan realecon.

Ragnarsson ESPLORAS la realon, ĉar tuj kompreni aŭ koni ĝin ne eblas: ĝi estas tro kompleksa kaj krome ĝia realeco ŝanĝiĝas kun nia mensa kreskado. La aŭtoro plikonsciiĝas pri la travivaĵo, kiun li esplor-esprimas, serĉpalpe envortigas, difini provas; kaj laŭ inversa esplorprocedo agu la leganto. Ekz. „La kondamnitoj", samkiel la pli longa „Ĉe la rando", pezas je enhavo; sed ĉi tiu estas elfosenda el la vorttavoloj: verŝajne ne ĉiuj egale interpretos la poemon.

La poezio de Ragnarsson estas jen interesa aŭ stranga, jen solena aŭ majesta, jen ĉarma kaj jen filozofie saĝporta.

Elserĉu mem !

La lastan recenzon verkis C.R.A. Declerck, la aliajn F. Roose.

## kulturo

BONAJ AŬGUROJ POR LA GALAPAGAJ TESTUDOJ

La gigantaj testudoj de la galapagaj insuloj finfine konos pli bonajn tempojn. Dank'al la registaro de Ekvadoro, al kiu lando tiu ĉi insularo en la Atlantika Oceano apartenas, la reptilioj kaj aliaj unikaj reprezentantoj de la galapaga faŭno nun ekkonos pli trankvilan vivon. Efektive, ekde 1535 kiam panama episkopo malkovris la Galapagojn, ĉar la ventoj hazarde lin blovis tien, la bestoj konis senfinan ekstermiĝon.

La giganta testudo kiu povas pezi ĝis 230 kilogramoj , estis por marrabistoj kaj poste por la balenĉasistoj rezervo de freŝa viando. Oni povis vivteni ĝin sur ŝipo, ne donante manĝaĵojn dum plena jaro.

Dek milionoj da testudoj tiel estis mortbuĉitaj aŭ kaptitaj de maristoj kies propra intereso aŭ la sporto superis ilian amon al la besto. Kapitano Woodes Rogers skribis antaŭ proks. 250 jaroj : „Ili estas la plej malbelaj kreitaĵoj de la naturo. Ilia gagatnigra karapaco ([1]) tre similas al la tegmento de pruntaŭtomobilo; ankaŭ la haŭto estas gagatnigra, sed ŝrumpinta kaj tre malglata."

Bestoj same danĝeraj kiel la homo

La importitaj bestoj kiel kaproj, porkoj, brutoj, azenoj, hundoj, katoj kaj musoj, montriĝis same danĝeraj kiel la homo. Tre multaj dombestoj denove iĝis sovaĝaj. Sekve de ekologiaj detruoj la insularo neniam denove ekhavos sian primitivan aspekton, eĉ ne tiun de 1835, kiam Darwin kun la „Beagle" ŝipis al la Galapagoj dum sia konata kruciro. Liaj perceptoj pri la testudoj kaj unika fringo-speco ([2]) inspiris lin por lia „De l'origine des espèces" (Pri la origino de la specioj). Ankoraŭ nun kelkaj aspektoj de la evoluo estas pli bone retroveblaj tie ol ie ajn.

Nur de mallonga tempo oni intense protektas tiun faŭneron kiu el scienca vidpunkto estas tiel grava. Ekvadoro nomis la Galapagojn naturprotektejo en 1931 sed la komerco per testudoj daŭris ĝis en 1950. Sub la aŭspicioj de Unesco estis starigita en 1959, unu jarcenton post la aperigo de „De l'origine des espèces", la "Fondaĵo Charles Darwin por la Galapagoj".

La esplorstacio de Santa Cruz, la ĉefurbo, unue okupas sin pri la nombrado de la gigantaj testudoj sur la diversaj insuloj kaj volas certigi ilian pluvivon. Sur la insulo Pinta ekzemple oni trovis virseksan ekzempleron tute solan. Oni nun alportis ĝin al la stacio kaj serĉas inan testudon de lia specio. Alia masklo havis pli da bonŝanco. La personaro metis lin sur insulon kie estas dekkvar samspecaj inoj. Nun tie paradas jam dekoj da testudo-beboj !

Ne plu ratoj

La ratoj kiuj estis importitaj antaŭ 50 jaroj sur la insulon Duncan, formanĝis ĉiujn novnaskitajn testudidojn. Sed per kelkaj ovoj kaj primitivaj kovilioj la centro sekurigis la pluekzistadon de la specio : 82 testudoj kiuj estis tiel grandaj ke ili jam ne devis timi la ratojn, estis transportitaj al Duncan.

Dum la lastaj jaroj la centro „produktis" jam pli ol 400 testudidojn. Oni volas atingi jaran grandiĝon de la popoleto per 100 ekzempleroj (20 de ĉiuj 5 specioj).

Estas tre danĝere movi testudajn ovojn ĉar ilia embrio tre facile rompiĝas. Oni lasas ilin en la naturaj nestoj kaj ĉirkaŭ ili oni ĵetas ratvenenon kaj oni konstruas el lafo muretojn kiuj devas malpermesi la alvenon de porkoj, hundoj ktp. Sed ĉio tio estas nur antaŭrimedoj. La problemoj por la testudoj restos.

Sed kiam ĉiuj problemoj estos solvitaj, tiam la testudoj, al kiuj la arkipelago ŝuldas sian nomon („galapago" estas malnovhispana vorto por testudo), povos denove iĝi tiel multnombraj kiel antaŭe, tamen neniam havante denove sian praformon kiu bedaŭrinde estas komplete ekstermita.

Ina testudo ekmetas ovojn nur kiam ĝi estas 50-jara, sed kiam ĝi komencas, ĝi daŭrigas ellasi ovojn dum pli ol unu jarcento...

(el „Unesco Informatie")

---

([1]) karapaco : ŝelo kovranta la dorson de testuduloj (het schild; la carapace; der Schild).

([2]) fringo : paseroforma birdo (de vink; le pinson, der Fink).



## aktualaĵoj

De la 18-a ĝis la 20-a de Oktobro okazos en Emst-Epe (Nederlando) malgranda seminario de N.E.J. pri aliaj planlingvoj kiel Volapük, Ido kaj Interlingua. Samtempe oni aranĝos por komencantoj parolgrupojn pri diversaj temoj. Prezo: 18 guldenoj. Info ĉe BEJA, Drakenhoflaan 97, Deurne.

Kiel ĉiujare ankaŭ ĉi-vintre la Antverpena Esperanto-Grupo organizos Esperantobalon kie ĉiu amiko de la Internacia Lingvo tutkore estas bonvena. Dato: 1974-11-23; Horo: 20 h.; Loko: Ringtheater, Pastorijstraat, Antwerpen; Eniro: senpaga.

Inter la 27-a de decembro '74 kaj la 4-a de januaro '75 okazos en Germanujo la klasika Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Bonvenas ĉiuj gejunuloj ĝis 30 jaroj. Loko ankoraŭ fiksenda. Estos aŭ Kassel aŭ Paderborn. Info kaj enskribiĝo ĉe la redakci-sekretario de „Sonorilo".

La jubilea 60-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago. Tio jam ne estas novaĵo por ni. Eblas enskribiĝi jam nun kontraŭ pli favoraj prezoj ĉe f-ino Andrée Orsolini, rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi.

La 31-an Internacian Junularan Konferencon de TEJO oni organizos en Herning, urbo en meza Jutlando, ĉ. 350 fervojajn kilometrojn de Kopenhago, verŝajne la semajnon post la UK. Pli da informoj vi povos legi en la venonta numero de „Koncize".

Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** P.V.B.A.

**ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30**

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"
Agentejo en Nederlando:
ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9
Telefono 1142 19 – Telekso 23243 – Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo    Unuaklasa servo
Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

P. V. B. A.

**FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

**Telefono 272875**